

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATA DE VUO

ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO :

1. LA VERDA FRONTO. — 2. LA 11-a KONGRESO DE FL. L. E.
— 3. KOMUNIKOJ DE LA ESTRARO. — 4. TRO LONGA TIU
VOSTO. — 5. MORTIS KOMPATINDA VIRO. — 6. LA STU-
DANTO. — 7. GENERALA JARRAPORTO DE FL. L. E. — 8.
INTER NI. — 9. BIBLIOGRAFIO. — 10. LA ANGULO DE LA
SERCEMULOJ.

Orgaan van den
VLAAMSCHEN ESPERANTISTENBOND

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA
FL. L. E (Vlaamsche Esperantisten Bond) FL. L. E.

HOOFDBESTUUR :

Voorzitter : Dr. Th. VAN GINDERTAELEN, Stefaniestraat 44, Antwerpen.
Ondervoorzitter : G. BAUMERS, Korte Veldstraat 35, Turnhout.
Secretaris : G. DEBROUWERE, Magdalenastraat 29, Kortrijk (tel. 1654).
Penningmeester : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel.

DIENSTEN :

Boekhandel (F. E. I.) : E. CORTVRIENDT, P. Van Humbeekstraat 3, Brussel-W.
Examens : Dr. F. ROOSE, Guido Gezellelaan 15, Brugge.
Tentoonstellingsmateriaal : G. DE BOES, Wijnstraat 81, Ronse.
Voordrachten : A. ACKAERT, Gerardstraat 162, Brussel 4.


ORGAAN :

« Flandra Esperantisto » verschijnt om de maand. — Redactie : Fr. VAN DOOREN, Langstraat 40, Borgerhout. Kopij uiterlijk op 15^{en} van elke maand bij de redactie. — Administratie : A. DE KEYZER, Vlaamsche Steenweg 70, Brussel. Postrekening nr. 2321.50 van Flandra Ligo Esperantista, Brussel. — Barema der advertenties op aanvraag bij de administratie.

BIJDRAGEN :

Leden-abonntenen : fr. 25.— 's jaars; gewone bondsleden : fr. 5.— 's jaars.

Escepta Oferto !



H. Haefker :
**JARMILOJ
PASAS**

Mond-
historio
originale
verkita
en
Esperanto

500 grandformataj paĝoj kun artaj reproduktajoj kaj geografiaj skizoj. Eble la plej impona verko kiu aperis en la lingvo internacia ! Ĝi estas evidenta pruvo, ke eĉ plej malfacila, spirita tasko perfekte povas esti majstrata per Esperanto. Mondhistorio de profesia, ŝtate premiita verkisto. « Jarmiloj Pasas » estas objektiva verko, riĉega je ideoj, fonto neelĉerpebla por la pliriĉiĝo de l'scio. En pli ol cent ĉapitroj preterpasas nian spiritan okulon la potenca Romano de l'Homaro. La eksterajo de la libro estas konforma al ĝia enhavo. Presita per klara litero sur senligna, fortika, malpeza papero. La bindo estas tuttola kun ora stampajo.

La prezo de tiu verkego estis ĝis nun fr. 150.—

escepta prezo : fr. 50.—

(plus fr. 2.50 por sendkosto; al membroj de Fl. L. E. ni sendas afrankite)

Mendu ĉe :

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO, P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

FLANDRA ESPERANTISTO

ORGANO DE FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

REDAKCIO : Langstraat 40
Borgerhout ANTWERPEN

ADMINISTRACIO : Vlaamsche Stw. 70
BRUSSEL. P. Ĉ. K. : 2321.50 de Fl. L. E.

La redakcio rezervas al si la rajton rifuzi, korekti, mallongigi aŭ iel ajn ŝanĝi la ensenditajn kontribuajojn.

Jara kotiz-abono 25 fr.

APERAS MONATE

LA VERDA FRONTO

Tre malproksime ĉiuj ni staras
La unuj de la aliaj...
Kie vi estas, kion vi faras,
Ho, karaj fratoj vi miaj?

L. L. ZAMENHOF.

La titolo ne estas mia. Estas sinjoro Th. Jung kiu en « Heroldo de Esperanto » ĝin enmondigis.

Jes, kial la tutmonda Esperantistaro ne starigu sian Verdian Fronton? La problemo estas preskaŭ tiom malnova kiel la Esp-movado mem, sed ĝi eble neniam estis tiel aktuala.

Verda Fronto? Kial ne? Kial ĉiuj Esp-istoj, ne povus certagrade kunlabori por defendi nian aferon? Kial niaj privataj opinioj, kaj la diverseco de niaj organizaĵoj ne permesus komunan agadon por punktoj de komuna Esp-intereso?

En ĉiuj Esp-gazetoj oni skribadis dum jaroj pri la sama temo, en ĉiuj Esp-medioj oni pri ĝi parolis ĝisenuige. La merito de « Heroldo » kuŝas en tio ke ĝi trovis la kuraĝon repreni la temon kaj ke ĝi lumigis el nova vidpunkto.

Verda Fronto. Supertendenca kunlaborado. Kvinjara Esp-olimpiado. Kial ne?

Grandaj okazintaĵoj ĵetas sian ombbron antaŭen. Ĉu en Flandrujo la intergrupna kunlaborado en Bruselo kaj Antverpeno, la supertendenca Ekzamena Komitato, kaj la okazontaj komunaj kongresaranĝoj de la du plej gravaj ligoj el la lando ne havas simbolan signifon?

Interesperantista kunfandiĝo neniam eblos. Ĉu la Verda Fronto ne estus la serĉata solvo?

Valorus la penon pristudi la aferon.

Fr. Van Dooren.

11-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista

Bruselo, 11-12 Majo 1940.

La tasko de la organiza komitato de nia 11-a kongreso ne estas subtaksinda : necesis ja en rekorda tempodaŭro organizi nian ĉi-jaran ĉefkunvenon. Malgraŭ tio ni konvinkigis ke en tiu tasko ni plene sukcesis kaj plenfide ni atendas la juĝon de niaj kongresontoj.

Nur kelkaj tagoj nin disigas de Pentekosto kaj sekve de nia kongreso. Por la 11-a fojo la flandra Esperantistaro jarkunvenos. Kiu el nia fidela membraro forrestos? Ni firme esperas ke ĉiujn (escepte mobilizitojn sen forpermeso) ni baldaŭ revidos en la ĉefurbo! Samideanoj, konsciu pri la graveco de nia laboro, precipe en la nuna periodo, kaj nepre plenumu vian devon partoprenante la ĉefkunvenon de via organizo.

Ne povas ekzisti kaŭzo por forresto. Ĉiujn aranĝojn ni adaptis al la cirkonstancoj por ke financaj malhelpoj ne estu baro por iu ajn. Atentu la malgrandan kongreskotizon, la reduktitan prezon de bonega tagmanĝo (ĉiu ĝin partoprenu!) kaj la moderajn hotelprezojn. Venu do kun ni pasigi kelkajn agrablajn horojn en samcelana kunesto, venu ĝui de bela festprogramo, venu partopreni en niaj kongresdiskutoj por la bono de nia Ligo kaj por la bono de nia kara afero. Sed tuj, hodiaŭ, urĝas!

Nie fieras ke ni jam kapablas publikigi unuan liston de aliĝintoj kiuj, je nia unua alvoko enskribigis sin. Al ili ni jam sendis la kongreskarton kiu samtempe rajtigas je 35 % da rabato sur la fervojo. Malgraŭ ĉio nia 11-a iĝos sukceso!

Ni petas niajn membrojn kiuj pro iu ajn kialo ne povas partopreni nian kongreson, tamen subtene pagi la malgrandan kotizon. Ĉiujn kongresdokumentojn kaj eventuale kongresfoton ili ricevos.

Unua listo de aliĝintoj :

LISTO DE ALIĜINTOJ.

1. Bockstael Yv., Denderleeuw; 2. De Boom Fl., Denderleeuw; 3. Ringoir M. L., Denderleeuw; 4. De Keyzer Ad., Brussel; 5. De Keyzer Lyd., Brussel; 6. Van Dooren Fr., Antwerpen; 7. Van Dooren S-ino, Antwerpen; 8. Dr Van Gindertaelen Th., Antwerpen; 9. Cortvriendt Em., Brussel; 10. Van Durme H., Antwerpen; 11. D'Haveloose G., Tielt; 12. Roose F., Brugge; 13. Couwenberg Fr., Blänkenberge; 14. Pittoors Ach., Antwerpen; 15. Lodema A., Antwerpen; 16. Van Peel P., Antwerpen; 17. De Haaff N., Antwerpen; 18. Van Geel J., Antwerpen; 19. Van As J., Antwerpen; 20. Volders F., Antwerpen; 21. Foquet J., Antwerpen; 22. Russak H., Antwerpen; 23. Jacobs J., Antwerpen; 24. Jacobs S-ino, Antwerpen; 25. Dockx E., Antwerpen; 26. Dockx M., Antwerpen; 27. Lamoen Yv., Antwerpen; 28. Van Tuyckom J., Antwerpen; 29. Keverijn L., Antwerpen; 30. Iserentant R., Brugge; 31. Van der Mast M., Antwerpen; 32. Goethals R., Antwerpen; 33. Moeskops A., Antwerpen; 34. Torremans R., Antwerpen; 35. Vermuyten H., Antwerpen; 36. Begodt A., Antwerpen; 37. Mertens J., Antwerpen; 38. Boyens E., Antwerpen; 39. Broodcoorens G., Brussel; 40. Debrouwere G., Kortrijk; 41. Debrouwere S-ino, Kortrijk; 42. Huysman J., Brussel; 43. Willems An., Breedene; 44. Willems Mar., Breedene; 45. Calloens L., Aalst; 46. De Rijke K. Gavere; 47. De Ruyver P., Ronse; 48. De Ruyver S-ino, Ronse; 49. Terrijn J., Gent; 50. Ackaert A., Brussel; 51. Hessens R., Brussel; 52. Cosyn Em., Brussel; 53. Mottoulle L., Brussel; 54. Baumers G., Turnhout; 55. Wouters H., Turnhout; 56. Knaeps M., Turnhout; 57. Nuyts H., Turnhout; 58. Dirckx L., Turnhout; 59. Bellekens Yv., Turnhout; 60. Bubbe J., Turnhout; 61. Lamers Th., Oud-Turnhout; 62. Erlingen Th., Beerse; 63. Rainson H., Mechelen; 64. Vanderpoel L., Mechelen; 65. Decaluwe Sim., Kortrijk; 66. Decaluwe Germ., Kortrijk; 67. Derieuw J., Antwerpen; 68. De Vos H., Merksem; 69. Boyens S-ino E., Berchem; 70. Van Rechem Maj., Asper.

PROVIZORA KONGRESPROGRAMO.

Sabaton.

17-a. La akceptejoj malfermiĝas en « Vlaamsch Huis », Groot Markt 16.

20-a. La akceptejoj translokiĝas al « Brasserie Flamande », August Ortsstraat 24 (apud la Borso).

Granda festvepero en la belegaj salonoj de « Brasserie Flamande », organizita en kunlaboro kun « Belga Ligo Esperantista » (B. L. E. samdate kongresas en Bruselo).

PROGRAMO :

Alparoloj de la prezidantoj de B. L. E. kaj Fl. L. E.
« Brusela Esperanto-Kantfloro » kun orhestra akompano.
Solkantoj kun orhestra akompano.

Paŭzo.

Simfonia orhestro.

« Paĉjo », unuakta gaja burleskaĵo de Mete, prezentota de la teatra rondo de sekcio Turnhout (Fl. L. E.).

Baledo prezentota de la dancrondo de sekcio Brugge (B. L. E.).

Paŭzo.

Je la 11-a fama dancorhestro dancigos la ĉeestantojn ĝis la ...-a horo.

Dimanĉon.

9-a. La akceptejoj funkcias en « Vlaamsch Huis ».

10-a. Generala jarkunveno de Fl. L. E. en la akceptejoj.

13-a. Komuna tagmanĝo en « Brasserie Flamande ».

16-a. Laborkunsido de Fl. L. E. en la akceptejoj.

20-a. Adiaŭa vespero en la akceptejoj. Dancado.

PRAKTIKAJ INDIKOJ.

Prezroj de la kongresaranĝoj :

Kotizo 5 fr. Komuna dimanĉa manĝo (enkluzive servmono), 15 fr.

Unupersona ĉambro (enkluzive servmono), fr. 17,50, 20, 25, 30.

Dupersona ĉambro (enkluzive servmono), fr. 25, 30, 35, 55.

Tuj anoncu vin por ĉiuj dezirataj kongresaranĝoj!

Adreso por korespondadoj : P. Van Humbeekstraat 3, Brussel-W.
Poŝtkonto 2526.28 je nomo de kasisto A. De Keyser, Vlaamsche steenweg 70, Brussel.

Responde al kelkaj petoj ni sciigas ke se pro iu ajn subita kaj neantaŭvidebla kaŭzo la kongreso ne povus okazi, la organiza komitato repagus (escepte la kotizon) ĉiujn ricevitajn monsendojn.

Ĉe alveno la kongresanoj unue sin prezentu en la akceptejoj kie ili ricevos la kongresprogramon kaj la ceteraj kongresdokumentojn.

La Organiza Kongreskomitato.



FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

Generala Kunveno en Bruselo, la 14-an de Aprilo 1940.

Ĉeestis reprezentantoj de sekcioj Aalst, Antwerpen, Brussel, Denderleeuw, Gent, Kortrijk, Turnhout. Sin senkulpigis : sekcio Ronse.

La kunsido okazis en la Flandra Domo, Granda Piac; ĝi malfermiĝis je la 10-a horo, sub prezido de S-ano Van Gindertaelen.

La prezidanto dankas ĉiujn kiuj spite al ĉio, tamen venis al Bruselo; li alparolos la ĉeestantojn je nomo de la nova estraro, kiu fiksis al si la devon, malgraŭ la malfacila tempo, zorgi ke Fl. L. E. kresku aŭ almenaŭ restu forta, por esti preta, kiam la okazo sin denove prezentos, konkeri por nia movado la tutan Flandrujon.

La sekretario voĉlegas la raporton de la antaŭa kunsido, kiu estas unuanime aprobita.

Post rimarko de la prezidanto, S-ano Wouters konfirmas ke la incidento inter la sekcioj Antwerpen kaj Turnhout, rilate al la kongresa teatraĵo, tre amike aranĝiĝis.

S-ro Broodcoorens raportas pri la stato de la aranĝoj por la venonta kongreso en Bruselo.

La estraro de Fl. L. E. rilatis kun Belga Ligo Esperantista kaj kun la Flandra Unuiĝo de Katolikaj Esperantistoj, por kune organizi la punktojn de komuna intereso, dum ke ĉiu ligo konservus sian plenan sendependecon kaj agliberecon por la aliaj aranĝoj. La Belga Ligo akceptis niajn proponojn; F. U. K. E. juĝis ke ĝi ne povas kunlabori, ĝi tamen promesis sendi deligiton.

Sekve okazis traktadoj inter la Loka Kongreskomitato kaj la delegitoj de B. L. E. por komune aranĝi feston sabate vespere kaj tagmanĝon dimanĉe.

La kunsido aprobas kaj sankcias tiujn traktadojn.

Pri la ekzamena komitato; ĉar detalaj klarigoj jam aperis en F. E. multo ne estas aldonenda. S-ano Van Gindertaelen respondas al kelkaj demandoj. Komuniko pri la starigo de tiu komitato estis sendata al ĉiuj gazetoj en Flandrujo, krome prospektoj estos haveblaj.

S-ro Roose, malhelpata pro profesiaj kialoj, petis sian eksigon kiel delegito de Fl. L. E. La prezidanto alvokas por anstataŭanto kaj ĉar kandidatoj ne estas prezentitaj proponas ke la membroj fidu en la estraro ĝis trovo de anstataŭanto, kies elekto estos submetata al sankciigo de venonta ligkunveno.

S-ano Cortvriendt, nome de la kongreskomitato, komunikas ke pro ŝparo de kostoj, ne estos presataj speciala leterpapero kaj kovertoj; li submetas modelon de ŝtampilo uzota de la L. K. K.; la kunsido ĝin aprobas.

S-ano Baumers, vicprezidanto, skizas la projekton de la laborprogramo por Fl. L. E., kiun li prezentos dum la kongresa laborkunveno.

Tiu projekto prezentas bildon de kompleta reorganizo de la interna, enlanda kaj eksterlanda vivo de Fl. L. E.

Le prezidanto dankas lin por tiuj kuraĝaj proponoj, kiuj estas grandparte aprobindaj sed kelkaj ankaŭ kritikindaj.

Estas decidite ke tiuj proponoj estos dissenditaj al la sekcioj por ekzameno kaj pristudo.

La sekretario komunikas ke la estraro decidis ree ekzameni la problemon pri eventuala aliĝo al internacia organizaĵo; al I. E. L. estis demandite ĉu ĝi akceptus la kunlaboron de Fl. L. E. egalrajte kun la aliaj naciaj ligoj, kaj eventuale je kiaj kondiĉoj. Venis respondo el kiu rezultas ke la komitato de I. E. L. ekzamenas la aferon sed ke pro la malrapidaj komunikoj internaciaj, pozitiva respondo venos nur post la 15-an de aŭgusto. S-ano Van Gindertaelen atentigas noti ke nia demando havis informigan karakteron kaj ne povas esti konsiderata kiel firma aliĝpeto.

S-ro Cortvriendt rimarkigas ke S-ano De Boes reprezentis nian Ligon kiel delegito en la L. E. E. N-kongreso sed ke oni forgesis sendi salutojn al la kongreso de F. L. E.; li proponas estontece saluti ĉiujn kongresojn en nia lingvo-teritorio.

Konsiderante la nunan situacion, kiu malhelpas multajn ĉeesti al la ligkunvenoj, la prezidanto demandas ĉu estas dezirinde okazigi ilin en sama nombro kiel antaŭe. Generalaj ligkunvenoj nun okazas ĉiun kvaronjaron; kvankam ne laŭstatute devigaj, ilia ofteco fariĝis tradicia; la demando nun estas ĉu daŭrigi tiun tradicion? La decido tiukoncerne apartenas al la kongreskunsido.

La prezidanto fermis la kunsidon je la 13,30 horo.

La Sekretario.

IRU AL BRUSELO,
NE FORGESU ĜIN,
ESTAS VIA DEVO;
NI ATENDAS VIN!

Tro longa tiu vosto!

JOZEF SIMONS.

Venis en la paroĥo nova pastro : juna, granda kaj blonda, afable kaj fervorplena, kaj, ho tiel babilema kun la homoj.

— Ni farigos lin tute taŭga, diris la maljuna sakristiano, kiu jam tri pastrojn entombigis, kaj kiu per ĉi-tiu specimeno sin kvaran fojon reprovizis. Li plenplene konsciis pri sia devo survoĝigi, eduki, poluri la novulon, ĝis kiam li konvenu en sia nova medio. Kaj ĉiuj paroĥanoj almenaŭ esperis tion de la pedelo.

Pasko alproksimiĝis, kaj la pastro movigis ĉielon kaj teron por enlogi per ĉiaj mielajoj, aŭ enpeli per fulmotondraj minacoj eĉ la tutlastan ŝtelĉasiston aŭ balaikolportiston en la konfesejon; li predikis ĝis kiam lia lango pendis sur lia brusto; li manplante kaj pugne martelis la katedron : neniu el la ĉiudimanĉaj dormantoj kapablis fermeti la okulojn. La inferajn turmentojn li priskribis kvazaŭ videblaj kaj senteblaj, kaj multaj aŭskultantoj sentis la malvarman ŝviton ekperli sur siaj fruntoj.

— Karaj parohanoj, tio, kion mi deziras al vi estas sankte timego al la peko, por ke vi postmorte ne enfalegu en tiun sulfurmaraĉon, el kiu la flamoj leviĝas turaltaj, kaj en kiu miljonoj... kiom?... miljarde da malbenitoj ĝemplorante kaj dentogrincante tordiĝadas kaj svarmegadas, sin turnadas kaj turniĝadas, turmentegataj en ĉiuj siaj membroj de hordo da laŭtridegantaj, saltantaj nigraj demonoj ruĝlangaj kaj kun flamj-tantaj okuloj, sub la estreco de tiu fiega monstro kiu nomiĝas Satano : naŭzega drako kun kurbaj kornoj, sangmakulitaj vitraj okuloj elorbitaj, pikilaj stoploharoj sur sia tuta abomena simia korpaĉo, kaj kun dika serpentuma vosto... eble ja centmetrojn longa.

Post la diservo, sidante ĉe la fenestro en la sakristio, la pastro muretis siajn dankpreĝojn, dum la sakristiano lavpurigis la karafetojn, enŝlosis la kalikon en la ŝrankon, enmetis la mesvestaĵojn en tirkeston, kaj ekzercis siajn fingrojn faldante la albon. Sed li daŭre ŝtelobservadis la pastron : tiu-ĉi sin ne forsavu, li havis ion pordiran sur la koro.

La pastro sin finkrucsignis, kaj intencis forrapidi al mantenmanĝo, sed dum li dekroĉis sian ĉapelon, la sakristiano grumblis laŭlonge sian nazon, ne suprenrigardante :

— Via Pastra Moŝto, tiu vosto de Satano, ĉu ĝi ne estis iomete tro longa?

— Pedelo, tio jam estis eliĝinta antaŭ ol mi konsciis; mi ja ekscesis iom, mi tion devas kontesi. Antaŭe jam okazis al mi ke en la ardo de l' prediko, mi perdis la mezuron... Mi ne povas malhelpi... Pri tio mi devus dekutimiĝi... Sed kiel?

— Se temas nur pri tio, Via Pastra Moŝto, tio baldaŭ enordiĝos. Se ankoraŭ okazos ke vi troigas, mi en la supra klavaro per ununura flutregistro foje « ĉip »-fajfos en la akraj notoj. Neniu atentos pri tio, kaj por vi estos signalo ke vi devas bremsi.

— Nu, en ordo... Bonfartu.

— Bonan apetiton, Via Pastra Moŝto.

La sekvantan dimanĉon, sur la katedro, la pastro tiom longe manovris ĝis kiam li povis reveni je sia antaŭa prediko por korekti tiun fuŝaĵon.

— Karaj parohanoj, li diris, mi pasintan dimanĉon iom troigis, mi sufiĉe palpeble priskribis la inferajn turmentojn, kaj eble iomete ekscesis... Tiu vosto de Satano, ekzemple, eble ja centmetra... Nu, ni diru dekmetra, jam sufiĉas, mi opinias.

— « Ĉip », akrete aŭdigis sur la orgenejo.

— ... aŭ eĉ nur okmetra...

— « Ĉip », resonis senhezite.

— ... aŭ, ni diru : sepmetra...

— « Ĉip », adis la pedelo senpardone.

Ĉu la sakristiano mokis lin? Kie do restas la proporcio inter tiu imponega ĉef-diablo, vere monstra besto, kaj ĝia monstra vosto? La pastro ekkoleris kaj findiris :

— ... aŭ, por cedi tutlastan fojon, ni diru sesmetra... dika serpentumvosto eble ja sesmetra... Sed, mi avertas vin, vi ankoraŭ povos « ĉip »-i kiom ajn vi volas, mi ne fortranĉos eĉ unu centimetron plu.

Kun permeso de la aŭtoro
tradukis por F. E. : **Mete.**

Mortis kompatinda viro

Ci tiu burlesko estas antaŭdiraĵo pri morto de viro, kiu estis bona Esperantisto. Lia fervoro estis tia, ke li laŭ propra diro volus mallongigi sian propran vivon, por aldoni kelkajn jarojn al la vivo de aliaj, pli kompetentaj samcelanoj, sed tio ne helpis, ĉar li atingis aĝon de 87 jaroj.

* * *

Do, estas je la 24-a de novembro 1983. Peza kiel plumbo pendis la ĉielo super Gr., malgranda vilaĝo ie en Nederlando. Seninterrompe kaj kvazaŭ plensitele terenfalas la pluvego kaj ĉiuj stratkanaletoj ŝprucpleniĝis, per la ĉiela akvo. Estas peza, griza tago kaj oni havis la senton, kvazaŭ la ĉielo falos sur la kapojn de la homoj, kiuj estas en la strato.

Cerkoveturilo preterpasas, survoje al la vilaĝa tombejo. Neniu funebra sekvantaro, neniu funebra krepo, neniu florkronoj akompanas la mortinton al la lasta ripozloko. Oni ankaŭ ne vidas familianon, nek amikon, kaj la malgranda veturilisto metas la blue frostiĝintajn manojn en la poŝojn, por restigi ilin varmaj. Grumblas la kvar ĉerkoportantoj; plej laŭte grumblas la veturilisto. Li suferas pro intestaj ribeloj kaj tia veteraĉo ne estas bona por lia malsano. Kvankam li eldrinkis antaŭ foriro grandan glason da brando, — diablo! jam denove formiĝas la malbenita gaso en la ventro. Fulmotondro! blasfemas la veturilisto, se ili — nome la gasoj — almenaŭ emus eliĝi, se necese, eĉ kun granda bruo! Li kolere klakvipas la ĉevalojn. Kompatindaj ĉevaloj!

Ekster la vilaĝo sternas sin la tombejo sur la deklivoj. Feliĉe, oni alvenis. La portantoj deprenas la ĉerkon de la ĉaro. Ili blasfemas, vidante, ke la nigra tuko estas tro fikse premita inter la ĉerko kaj la ĉarflankoj. Jen la pastro. Li estas malpacienca. Pro la pluvego liaj lipharoj algluiĝis ĉe la buŝanguloj. Stentore li krias :

« Kial vi ne povas pli rapidkrure veni? Estas aĉa vetero! »

En angulo de la tombejo oni fosis la tombon. Tien oni iras kun la ĉerko; kaj dum irado la koto fiksiĝas al la ŝuplandoj. La solenaĵo estas mallonga. Ĉar neniu akompanis la mortinton. Ankaŭ la pastro mallongigis la meditadon pri sendaŭreco de la surteraĵoj. Generale la pastro salutas per trifoja kliniĝo direkten al la ĉerko, sed nun li tion forgesis; eble pro la veteraĉo.

Nun la ĉerko estas en la tero.

Malrekta fosto kun la dato : 24-XI-1983 montras la lokon, por ke pli poste alvenontoj sciu, kiu tie troviĝas la lastan ripozlokon.

Tiam denove la veturilisto tiriĝas la ŝnurojn de la ĉevalojn kaj ĉiuj iras for.

« Estas malagrabra vetero » diras la veturilisto, « precipe, kiam la stomako ne estas en ordo. »

Kaj post paŭzeto li aldonas :

« Kiu estis la mortinto? »

Respondis unu el la ĉerkoportantoj :

« Mi ne scias, sed certe malriĉa viro; iu kompatinda diablo, mi kredas ke lia antaŭnomo estis Pierre... Ne unu animeto akompanis lin... florkronoj kaj funebra krepo forrestis... la kostojn prenis sur sin la vilaĝestraro... oni diras, ke li fordonis sian tutan monon al ia sensencaĵo... »

(Verkis speciale por F. E. : Pierre Agrafal.)



Ĉiujn korespondadojn sendu al la redakcio : Stefaniestraat 44, Antwerpen

I.

ALFABETO : LA ĤO.

La dirita litero havas malfeliĉan sorton : multaj Esperantistoj ĝin kvazaŭ ekskomunikis; se ili devus ekspliki sian sintenon, ili verŝajne povus apeli nur la modon aŭ resti fiŝe mutaj. Kvankam la problemo estas neniel mondmoviga — pro la relativa malofto de la ĥo-vortoj — valoras ja la penon rimarki ke :

a) La koncerna litero troviĝas, kiel la aliaj, en la Fundamento kaj ŝajnas do samrajta; krome neniu oficiala instanco, almenaŭ miascie, ĝin forigis el nia alfabeto.

b) Kompleta, principa anstataŭigo de ĝi per ko estas malfacile enkondukebla : kiel tiam distingi ĥolero-n kaj kolero-n, ĥoro-n kaj koro-n ? Tiu konfuza rezulto substrekas ke miksitaj uzo, ĉar la ĥo ne povus malaperi, estas simple — jam fonte — mallogika, iom arbitra kaj kondukos al ĥaoseco.

c) La ĥo-sono tute ne ŝokas la lingvosenton (kial pli ol ĉo, ĝo ktp.?), kaj esprimas ekz. en la vorto « melanholio » la profundan kaj originalan « koloron » de ĝi.

Resume : ni kuraĝe uzu la kompatindan ĥo-n, almenaŭ ĝis kiam seriozaj pravigoj kaj valoraj argumentoj estos pruvintaj ĝian malutilon kaj la taŭgecon de la reformo.

T. V. G.

II.

A) Por komencantoj : traduku.

a) PROCESO : En unu societo oni demandis pentriston, kiel oni povas plej reliefe prezenti du procesantojn, el kiuj unu gajnis la proceson kaj la dua ĝin perdis. — Mi pentrus la unuan en ĉemizo kaj la duan nuda, respondis la pentristo.

b) RAPORTO : En Londono unu krimulo devis esti mortigita. Antaŭ sia morto li malsaniĝis kaj oni sendis lin en la malsanulejon. Post unu semajno la ĉefa kuracisto skribis al la juĝejo : « La arestito N. saniĝis, kaj oni povas lin mortigi sen malutilo por lia sano ». (S. R-n).

c) UNU ADVOKATO, tre malgranda, venis juĝejon, por defendi la aferon de sia kliento. Alia advokato, vidante lin, demandis, kiu li estas. Tiu respondis. Tiam la unua ekkriis : « Kio? tia malgranda advokato? Mi ja povas vin kaŝi en mian poŝon! Vi povas, trankvile diris tiu, kaj tiam en via poŝo estos pli da saĝo, ol en via kapo ». (M. Solovjev).

Korekto.

1. Estas dezirinde, atente legi la frazojn, antaŭ ol traduki ilin. Ankaŭ estas konsilinde, tiel skribi, ke via tasko estos facile legebla.

2. La turo de nia vilaĝo estas alta ne pli ol 40 metrojn. Ĉu la turo de via vilaĝo estas pli alta?

3. La plej granda domo el tiuj tri estas loĝata de la eksurbestro de nia urbo. Li loĝis tie jam tri jarojn.

4. En aŭtuno la fruktojn maturiĝas kaj la vento nudigas la arbojn.

5. Atendinte kelkajn minutojn, li daŭrigis sian rakonton.

6. Kiom malvarmas tie? Kiu estas la pli aĝa el vi?

7. Kiom ajn li penadis, li ne sukcesis atingi sian celon.

8. La falinta arbo baris la vojon, tiel ke ni ne povis daŭrigi nian promenadon.

B) Por progresantoj : esperantigu.

En ik kon niet oordeelen of het de oude was die den jongen van elf jaar geleidde, ofwel of de knaap zijn grootvader ondersteunde.

Soms was Collot wel eens bij hem. Maar Collot had andere makkers gevonden. Collot had nog een soldatenhart bewaard in zijn oude dagen, en nu zat hij den godganschen dag te kaarten of te teerlingen, en was heelemaal op eenderen voet geraakt met de soldaten van zijn Stube.

Maar vadertje Musset was te oud, te versleten, het baldadige weg-rukken uit zijn stille Marnedorpje had hem te zeer geschokt, geen enkel oogenblik van al de dagen die hij hier heeft doorgebracht, heeft hij begrepen waarom al waarvoor, — hij is op. En elken dag is hij meer verlaten en eenzaam rondgeslenterd in het groote roezemoezige kamp. En wanhopig klampt hij zich vast aan zijn kleinzoontje, het eenige waarvan hij zeker is, dat hij begrijpt. (Daurigo : « Vadertje Musset » de E. Claes).

C) Por ĉiuj : korekto.

In één adem. — Maak U niet noodeloos druk! — Ge zijt een flinke jongen. — De gangbare denkbeelden van de massa. — De gemeenste schurk. — In het gewoel van den strijd. — Goedschiks, noch kwaadschiks. — Hooren, zien en zwijgen! — Hij is uw oogappel. — Een pak slaag. — Samenloop van omstandigheden. — Waar is de tijd gebleven? — Een verkwikkende slaap. — Voor goed heengaan. — In staat van wildernis. — Schelden doet geen zeer.

III.

RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

Al diversaj. — Kial la uzo de no (traduko pasintmonata de « Vadertje Musset », alineo 3) ĉe « ĉiutage iom pli maljunan kaj malgrasan » kiam « vagadanta » aperas sen no? Koncize ni respondu ke :

a) maljunan ktp. estas apozicio de paĉjon Musset, akordiĝanta nombre kaj kaze kun ĝi.

b) vagadanta estas tutsimple adjektiva adverba komplemento.

Al J. C., Antwerpen. — Ni dankeme ricevis vian leteron kaj la demandojn : pro manko de loko ni hodiaŭ ne povas respondi; ni eventuale donos en persona letero nian opinion. Vi tamen notu ke ni pritraktis unu el la punktoj en la « ĉef-artikoleto ».

Al ĉiuj. — Kelkaj plendis pro tio ke la Studanto ne estas sufiĉe ampleksa; nu, tio povas esti ŝanĝita, se nur dudek legantoj esprimas tiun deziron. Ĉu estos tiom da interesatoj?

Pres-eraroj en la Studanto de aprilo.

P. 56, alineo 4 : agi laŭ la maniero 3 iĝas memkompreneble maniero 2; p. 57, Paĉjo Musset, al. 1 iĝas : Nun mi rakontos al vi kiel paĉjo Mussel el. C. en D. finis sian vivon, tiel malĝoje finis sian vivon en la militkaptitejo de E.; p. 57, id. al. 3, linio 6 : ion de pajo iĝas iom da pajo; p. 57, korekto de C) : melankolie devas esti melanholie.



La artikoloj, pri kiuj respondecas nur la verkintoj, povas esti subskribitaj per pseŭdonimo, sed la sendinto devas konatigi sian nomon al la redakcio. La artikoloj estu kiel eble plej trafaj kaj koncize verkitaĵ.

KION NI POVAS FARI POR LA ESPERANTO-IDEO ?

Kia demando, vi eble diras. Sed antaŭ ol respondi mi permesas al mi fari duan demandon : Kial nia ideo, kiu tamen ne estas tiel nova, estas tiel nekonata de la homoj? Kial nia afero — kiu jam estas sesdek jara — ne nur ne progresas, sed eĉ iuloke reenpaŝas? Eble multaj gelegantoj pretiĝas kolere kontraŭdiri miajn asertojn, sed se ili nur volas ĵeti rigardon sur la historion de nia movado, komparante la hodiaŭan periodon kun tiu de antaŭ du-tridek jaroj, ili konsentos.

Estas multaj ideoj, multe pli junaj kiuj ne nur disvolviĝis rapide sed kiuj eĉ travivis plenan sukceson. Ni pensu momenton nur pri la politikaj movadoj kiuj ekfloris. Kia do, estas la kaŭzo ke nia afero ĝis nun malsukcesis, kvankam ke ĝi bezonas nek grandegan financon helpon nek sangverŝadon por sia venko?

Multaj respondos ke la homaro estas tro materialista kaj nur laboras kaj penas por profitdonaj aferoj. Aliaj respondos ke la ekonomio estas la kaŭzo kaj ke por sukcesigi nian aferon unue necesas solvi la ekonomiajn kaj socialajn problemojn.

Tiuj respondontojn oni povas klasigi en du grupojn : unu kiu kontraŭstaras la Esp-movadon ĉar ĝi estas « nur fantaziaĵo ». Kun ili ni ne diskutu; feliĉe ili ne troviĝas inter ni, kaj ilin kritiki estus nur donkiĥotaĵo. Mi preferas paroli pri la dua grupo; tiuj kiuj konfesas ke la Esp-ideo estas laŭdinda, kiuj lernis la lingvon, kiuj portas la Esp-insignon, sed kiuj diras : « Kion ni povas fari se la homoj ne volas akcepti nian aferon? ». Kaj ili aldonas ke mankas veraj idealistoj.

Pri tio mi ne konsentas, ĉar estas fakto ke estas miloj da homoj kiuj nuntempe sin ofertas por siaj idealoj kaj kiuj propravole troviĝas en malliberejoj kaj karceroj. Ĉu ili pravas aŭ ne, tio tute ne gravas, la fakto restas ke inter la homoj ne mankas idealistoj kiuj pretas sin oferi.

Ne, la kulpo estas nia, kaj ni ne ĵetu ĝin sur la ŝultrojn de la anonima homaro. La aliaj « ismoj » progresis kaj sukcesis tial ke ĝiaj disĉiploj fiere portis siajn flagojn, kaj pretis ĝin defendi, sur barikadoj se necesis. Se ni, Esperantistoj, estus tiel oferemaj Esperanto jam delonge estus sukcesinta.

Kaj nun ni reprenu nian unuan demandon : Kion ni povas fari por la Esp-ideo? Ni povas multon fari. Kaj kion ni faras?

Neion.

Pardonu al mi tiun akran esprimon sed ni iru rekte al la kerno, ni konfesu nian kulpon. Ĉu, ekzemple, semajna duhora klubkunveno dum kiu oni iom lernas kaj multe babilaĉas povas pretendi helpi mond-movadon? Tio ja povas esti agrabla, amuza kaj interesa sed kia signifo tio povus havi rilate nian grandegan celon esperantigi la mondon kun ĝiaj centmiloj da homojn.

Se ni tiel daŭrigas, ĉu ni post mallonga tempo, ne estos disbatitaj likviditaj kaj forgesitaj?

Se ni volas sukcesi ni devas batali kaj ataki. Jes vi bone legis : batali kaj ataki, sed via Esp-koro ne tro ektimu, estimata leganto, ĉar ni ne batalu per murdiloj sed per armiloj pacaj kiaj uzis Sokrates, Spinoza, Kopernik kaj NIA Majstro, kiu en sia vivo, dum kelkaj jaroj sukcesis atingi pli ol ni depost lia morto.

Sed kion fari?

Ni ĉesu esti sektanoj, ni elportu nian ideon surstraten, ni studu kaj apliku kaj se eble ankoraŭ plibonigu la organizmanieron de niaj movadoj. Ni aranĝu enketon mondskalan pere de nia Esp-gazetaro al kiu partoprenu ĉiuj samideanoj. Ni agu laŭ la pulsbato de la Esperantistaro.

En niaj grupoj ni aranĝu la kunvenojn tiel ke ili allogu por ke ne kelkaj sed ĉiuj membroj ĉeestu. Kial ne zorgi ke en ĉiu urbo estu Esp-domo, do unu ejo por ĉiuj grupoj kie la Esp-istoj troviĝus hejme kaj kie povus okazi ĉiuj kunvenoj, prelegoj, ktp?

Jes, mi scias, multaj el vi mokos pri mi kaj opinios min naivulo. Mi al vi petas nur unu aferon : priprenu pri mia artikolo, kaj vi konvikiĝos ke per bona volo miaj « fantaziaĵoj » povas realiĝi.

Henĉjo.



ANTWERPEN. — **Flandrema Grupo Esperantista.** — Malgraŭ la malfacila tempo la sekcio tre aktivas. La kunvenoj okazas regule ĉiumerkrede kaj estas sufiĉe multombre vizitataj.

La grupo praktike subtenis nian 11-an Fl. L. E.-kongreson, enskribinte ĉiujn siajn membrojn.

Grava sukceso. Sekve de la senlaca laboro de nia aktiva s-ano Van As, « De Dag », la granda flandra gazeto, denove publikigos ĉiusemajne grandan ilustritan artikolon pri Esperanto. S-ano Van As, kiu prizorgas tiun servon, petas al ĉiuj membroj de Flandra Ligo Esperantista sendi al li artikolojn kaj fotografaĵojn por tiu rubriko.

BRUSSEL. — **N. E. L. E.** — La tuta sekcio fervore laboras al la organizado de kongreso. Ĝi salutas al ĉiu : « Ĝis revido en Bruselo ».

TURNHOUT. — **La Turnhouta Espero.** — Estas ĝojige konstati ke malgraŭ la malfavora tempo, la diversaj sekcioj de tempo al tempo donas vivosignon pere de la organo. Ni ankaŭ povas fiere deklari ke nia ne multnombra grupo estas ankoraŭ vivplena. Ni regule ĉiumerkrede kunvenas, kaj klopodas nin iomete perfektigi en la lingvo. Dum la vintraj monataj ni eĉ tradukis flandran novelon, de iu Turnhout-ano en Esperanton. Ni konsilas al la aliaj grupoj fari tiajn tradukaĵojn, tio havigos al ili multajn agrablajn horojn.

Dum la venonta kongreso en Bruselo nia teatra rondo denove kaj plenkonscie kunlaboros. Jam dum kelka tempo ĝi pristudas novan gajan teatraĵeton, kiu estas verkita de klubanoj niaj. Ni ĉeestos kiel eble plej multnombro la kongreson !

NEKROLOGIO. — En aprilo mortis la patro de F-ino A. Bombeke, membrino de sekcio Gent. Al la familio nian koran kondolencan.

Flandra Ligo Esperantista Ĝenerala jarraporto 1939

1. — ENKONDUKO.

La jaro 1939 estis periodo de agitado. Se, en la raporto de 1938, ni jam notis ke la internaciaj cirkonstancoj abrupte haltigis nian kreskadon, ni nun devas registri pli gravan fakton, nome la perdon de parto el la tiel pene akirita prospero.

Laboro bazita sur idealismo nur povas flori en serena atmosfero. La ĉie reganta malkvieteco malbone influas la Esperanto-movadon; la forta kaj sana bazo de nia organizo tamen ebligis ke ĝi relative bone rezistis el la unuaj atakoj de la kataklismo kiu skurĝas Eŭropon.

La ĝenerala apatio kiu karakterizas la jaron 1939, sin respegulas en la nuna jarraporto, kiu, escepte nian jubilean kongreson en Antwerpen, ne povas mencii notindajn okazintojn.

2. — NIAJ KURSOJ.

La nova leĝo pri dungo de eksterlandaj laborfortoj malhelpis la enoficiigon de fremdaj Cseh-instruistoj, tiel malaperis la kursa centro kaj tute perdiĝis la fonto el kiu ni ĉerpis lasttempe la novajn elementojn.

3. — SEKCIOJ KAJ REPREZENTANTOJ.

La vivo de la Ligo estas la spegulo de la aktiveco de la sekcioj. Trafoliumante la rubrikon « Grupa Vivo » en Flandra Esperantisto, oni povas konstati ke la vigleco de la sekcioj estas tute ne kontentiga, eĉ konsiderante la eksterajn cirkonstancojn. La pasinta jarraporto ankaŭ enhavis plendon rilate al manko je aktiveco flanke de la sekcioj kaj reprezentantoj. Ni devas konstati, ke malprave oni tro volonte kulpigas la militkrizon.

En la komenco de 1939 Fl. L. E. havis 50 sekciojn, nombrantaj 733 anojn. Krome estis 157 individuaj membro-abonantoj. Diversaj el la novaj sekcioj, stariĝitaj okaze de Cseh-kursoj, malaperis en la daŭro de la jaro.

La aktiveco de niaj reprezentantoj estis malgranda. Krom la rubriko « Komunikoj de la Estraro », kiu regule aperis en F. E., aperis 2 numeroj de « Komunikoj », stencilita bulteno kun praktikaj indikoj kaj konsiloj, kiun ricevis niaj sekcioj kaj reprezentantoj.

4. — FLANDRA ESPERANTISTO.

Dum preskaŭ ĉie la situacio malfavore influis la aperon de gazetoj, nia revuo daŭre eldoniĝis en la kutima formo kaj amplekso. La decembra numero estis la 126-a kiu ĉiumonate, jam dum 10 jaroj, regule kaj sen interrompo, malgraŭ oftaj malfacilaĵoj, atingis la abonantojn.

Je la ekŝiĝo de s-ano Pittoors, la redaktoreco transiris dum mallonga tempo al s-ano Broodcoorens, post kio s-ano Frans Van Dooren akceptis funkcii kiel redaktoro.

Al F. E. estis aldonata ĉiumonate kvarpaĝa bulteno « Flandra Studanto », sub redakcio de s-anoj Coppé kaj Symoens.

5. — FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO.

La estraro dum 1939 konsistis el : f-ino Terrijn, prezidantino; s-ano Debrouwere, sekretario-kasisto; s-ano Cognie, komisaro.

Dum kunveno de 17-12-1939, s-ano Debrouwere petis malŝarĝon je parto de siaj taskoj; tial la administrataro por la jaro 1940 estis jene fiksita :

- Prezidantino : f-ino Terrijn.
- Sekretario : s-ano Debrouwere.
- Direktoro-kasisto : s-ano Cortvriendt.
- Komisaroj : s-anoj Cognie kaj De Keyzer.

Jena bilanco estis aprobita :

AKTIVO :	PASIVO :
Libroprovizo fr. 17.358,40	Akcioj fr. 3.000,—
Debitoroj 479,30	Prunto de Fl. L. E. 4.000,—
Enkaso 3.572,77	Havaĵo F. E. I. 8.638,73
fr. 21.410,47	Saldo 5.711,74
	fr. 21.410,47

6. — ĜENERALAJ KUNVENOJ DE FL. L. E. KAJ KUNVENOJ DE LA ESTRARO.

Krom la laŭstatuta jarkunveno dum nia Antverpena kongreso, okazis 2 ĝeneralaj ligkunvenoj, nome la 19-an de marto en Gento kaj la 17-an de decembro en Antverpeno.

Dum la lasta kunveno okazis parta renovigo de la ligestraro. Estis elektitaj, kiel prezidanto : s-ano T. Van Gindertaelen; vicprezidanto : s-ano G. Baumers; estis reelektata : s-ano A. De Keyzer, kasisto.

La estraro kunvenis 4 fojojn por pritrakti la urĝajn aferojn.

7. — FINANCA RAPORTO.

ENSPEZOJ :	ELSPEZOJ :
Enkaso je 1-1-39 fr. 9.319,78	Preso, ekspedo (12 n-oj) fr. 8.373,25
Kotizo 12.998,25	Administracio (Ligo-Revuo) 1.150,—
Anoncoj 505,—	Korespondelspezoj (estraro) 116,85
Diversaĵoj 20,—	Kontorbebezonaĵoj 100,00
	Vojaĝkostoj (del., estraro) 566,75
	Presajoj 456,45
	Migranta Ekspozicio 100,85
	Kliŝoj 371,85
	Elspezoj de la redakcio 200,70
	Kursa Centro (deficito) 2.158,25
	10-a Kongreso (deficito) 295,10
	Diversaĵoj 325,80
	Enkaso 31-12-39 8.627,10
fr. 22.843,03	fr. 22.843,03

KASSTATO JE LA 31-a DE DECEMBRO 1939.

Enkaso 31-12-39 fr. 8.627,18
Prunto al Flandra Esperanto-Instituto 4.000,—
Sur poŝtkonto 4.627,18

8. — KONKLUDO.

1939 ne nur estis halto en la progreso de la lastaj jaroj, sed bedaŭrinde por la unua fojo kondukis al malkresko de nia membraro. Kvankam tiu malkresko ne ankoraŭ endanĝerigas nian agadon, necesos streĉi, en la venonta jaro, ĉiujn fortojn por, per nia propagando kaj kursoj, certigi alfluon de novaj membroj.

La diversaj servoj : migranta ekspozicio, prelegistoj, grupkonsilanto, gazetaro, tute ne, aŭ nur sensignife laboris. Traktadoj okazis por starigi ekzamenan komisionon, interkonsile kun la aliaj enlandaj asocioj.

Ekde septembro la estraro trafis la oportunajn decidojn por adaptiĝi al la minacanta situacio kaj pristudis planon por laŭcirkonstanca agado.

Ni havas la plenan konvinkon ke, se ĉiuj niaj membroj restos solidare fidelaj al la komuna idealo, Flandra Ligo Esperantista triumfe eliros ĉi tiun krizon kiun ni esperas efemera.

LA ESTRARO.

bibliografio

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias. Verkoj, senditaj al aliaj adresoj ol la redakciadministracio aŭ F. E. I. estos ignorataj.

CITAĴOJ EL GRAMATIKO. Verkitas ag Bernardo Ojasono. — Eldono de la aŭtoro, 1940, 16 paĝoj, 13,5 × 19,5 cm. Prezo ne indikita.

Kiel enkondukon la verkinto skribas i. a. : « La gramatikajoj ne as skribitaj por altrudo iujn formojn lingvaj, sed por klarigo pri la lingvostrukturo kaj por fari miajn verkaĵojn pli kompreneblaj ». Mi ŝatus respondi, ke se li volas, ke la Esperantistaro komprenos liajn verkaĵojn, li komencu verki en **Esperanto**, anstataŭ instrui **jargonon**. Sed la redaktoro F. E. atentigis min pri aliaj frazoj en la enkonduko : « La citaĵoj as fragmentoj el la gramatiko de la oficiala Esperanto, nur pliriĉigita tiu » kaj « Nenia forlaso nek ŝanĝo faritas al fundamenta Esperanto » kaj petis recenzadon el tiu vidpunkto.

La strangajo konsistas el :

1. Anstataŭigado de la formoj de « esti » per la nuraj « as », « is », « os », « u », « us » kaj « i »;
2. Uzado de formoj kiel « verkitas », « loĉatas », « uzatas » k.t.p.;
3. Uzado de « ag » (radiko de « agi ») kiel prepozicio;
4. Intenca anstataŭigado de « n » per « al », ekz. en « Eklego signifas AL komenco al lego » kaj « Oni metas AL inter... »; sed ankaŭ la kontraŭo ekz. en « Loĝo domoN » kaj « Instruo legoN al infano »; stranga uzo de « kun » ekz. en « Konsilo KUN patro » (ni dirus : konsilo patRA) kaj « Konsilo KUN patreco » (patrecA konsilo)!

5. Kiel jam estas mizera kutimo, kiam Esperantistoj skribas pri gramatiko, la aŭtoro diras la plej strangajn aferojn, sed kvazaŭ nur instruante ĉie konatajn fenomenojn al junaj infanoj, por kiuj ĉia diskuto estus tute senvalora, ĉar ili ja ne kapblas juĝi.

Ŝajnas al mi pli oportune, pritrakti la punktojn en inversa sinsekvo. Pri 5. S-ro Ojasono simple ignoras la teorion pri la radikokategorioj, akceptita praktike de ĉiuj gramatikistoj, kaj sen ia ŝajno de diskuto li ĝin anstataŭigas per kelkaj vortoj da nova teorio.

Pri 4. Tiaj aferoj ŝajnas esti pli gravaj (t. e. por la gramatikistoj-akuzativistoj) ol ili esence estas. Sed mi demandas min, kial perforte ŝanĝi kutimojn sen motivo? Vere, speciale rilate al « loĝo domoN » k.t.p. S-ro Ojasono estus povinta citi la majstron, sed certe ne rilate al « al inter ».

Pri 3. Inter la pli ol 30 Esperantaj prepozicioj estas kelkaj « strangaj birdoj ». Sed la ĝenerala regulo estas, ke la substantivo, kiu sekvas la prepozicion, estas la (ŝajna) rekta komplemento (kaj ne la subjekto) de la verbo, formita el la prepozicio. Ekz. se « la arbo staras ANTAŬ la domo », la arbo kaj ne la domo antaŭas. Do, en « verkitas ag Ojasono », S-ro O. devus ne esti la subjekto de « agas ».

Pri 2. Nu, se poeto absolute volas gajni du silabojn per tia « licenco », ni lin ne mortpunos. Sed kontraŭ la enkonduko al la ordinara lingvo ekzistas praktika malhelpo. Estas ja granda nombro da radikoj (multe pli ol cent nur oficialaj, inter kiuj diversaj verbaj) kies lastaj literoj estas ant, at, int, it, ont kaj ot, ekz. brokant', konstat', medit', rakont', rabot', k.t.p. Tiu « senkulpa » proponeto estus do vera « troja ĉevalo » por enkonduki konfuzon!


Pri 1. Per si mem ne gravas al nia lingvo, se kelkaj « gravuloj » skribas « as » anstataŭ « estas », aŭ « k. » anstataŭ « kaj ». Sed multaj Esperantistoj (kaj S-ro O. subtenas ilin) supozas, ke « as » ĉiam signifas estas. Kaj ili prenas ĉiam la samajn ekzemplojn el unu klaso de verboj (adjektivaj radikoj, kiel « san », kiuj plej alproksimiĝas al tiu regulo). Sed klopodu ĉe marteli, kroni, fabriki. Vere, kontraŭ tio S-ro O. havas rimedon : signUMi, martelUMi, nomUMi (denove : senanonca propono!). Pli grava klaso estas la verbaj radikoj. Klopodu ĉe « mort'i », « fali », « iri », « veni ». Sed la plej gravaj estas la transitivaj. Ekz. « vek'i ». Ĉiu, sinescepte estas konjugaciebla per « iĝ », kaj ĉar la signifo de « iĝas » jam estas fiksita, ni trovas la sencon de « veka » el : « vek'iĝas = iĝas veka »; do « veka » havas nur statan senson.

F. W. BUENTING.

angulo de la ĉeremuloj

Por ĉiu bona solvo ni notas unu poeton. 10 poentoj rajtigas al premio de 5 fr. Por ĉiu solvo uzu apartan folion, gluu sur ilin la koncernan konkurskuponon kaj indiku klare legeble vian nomon kaj adreson. La difinoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu sendataj antaŭ la 5a de julio rekte al S-ano Ferd. VOLDERS, Twee Nethenstraat 46, Antwerpen.

PROBLEMO No 103.



HORIZONTALE : 1. Alkaloido tre venena (C17, H23, O3, N.) (R). — 2. Prepozicio; legomo kun manĝebla radiko (R). — 3. Konservi en vinagro (R); akvo (R). — 4. Preciza tempo (R); asecura kontrakto (R); raba besto (R); 5. Marŝi (R); senti minacantan danĝeron (R); adverbo. — 6. Resti ĝis...; okono de cirklo (R); 7. Pron. pers.; adverbo. — 8. Malfacila divenotaĵo; malgranda fiŝo en oleo (R). — 9. Trinkaĵo (R); kotono (R); naĝbarelo (R). — 10. Parto de veturilo (R); trinkujo (R); insekto (R). — 11. Malglaciĝi (R); homo kun honora titolo (R). — 12. Intermona loko (R); divido de la daŭro (R). — 13. Grimpanta arbeto kun bonodoraj floroj (R).

VERTIKALE : 1. Rekta linio tra cirklo (R). — 2. Jarparto (R); malkonsentado (R). — 3. Fritilo (R); ŝati; necesa farotaĵo (R). — 4. Spirgaso (R); penetrigi; verdflava sekrecio de la hepato (R). — 5. Manĝebla intesto de bestoj (R); ludkarto (R); subtera loko (R). — 6. Skribi pri io mallongan memorigan resumon; oviforma (R). — 7. Kanto (R); pon. pers.; sufikso; pron. pers. resenda. — 8. Samsoneco de finaj silaboj; metalo (R). — 9. Floro (R); demanda adverbo; iame. — 10. Parto de preĝejo (R); ĉiama (R); obstrukcio (R). — 11. Persekuti (R); voĉo (R); kartkoloro (R). — 12. Restaĵo el disfalinta konstruo (R); speco de sambuko kies floroj estas uzataj en medicino (R). — 13. Persono kiu sin amuzas per ŝercaj malicetaj agoj (R).

PROBLEMO No 104.


DEVINONTAĴOJ.

- | | |
|--|-------------------------------------|
| La unua estas prepozicio. | La unua kuras (R). |
| La dua similas galopon (R). | La dua grimpas (R). |
| La tria estas metafo. | La tria krias (R). |
| La tuta (tri kune) estas ŝtatoficisto. | La kvara ploras (R). |
| Mia unua estas dombesto (R). | La tuta (4 kune) estas grava ŝarĝo. |
| Mia dua estas kanto. | Mia unua estas fiŝorgano (R). |
| Mia tuta (du kune) estas negativa elektrodo. | Mia dua montras ekstreman vivecon. |
| | Mia tuta (du kune) formas portilon. |


Kiu bone solvos 3 enigmojn ricevos unu poenton. Kiu bone solvos ĉiujn 4 ricevos specialan premieton.

PROBLEMO No 105.
PLEKTADO.

1. Kapitano (R).
2. Ludilo.
3. Ornamaĵo al virina kapo.
4. Desegnaĵo el rapide faritaj linioj.
5. Petrolo (R).



PROBLEMO No 102.
PLEKTADO.



1. Propriĝi al si kaŭzante al aliaj malutilon.
2. Ekmontriĝo.
3. Idealo.
4. Azia duoninsulo (R).
5. Kolekto da historiaj faktoj.

Nota : Pro preseraro ĉi tiu problemo el la antaŭa numero iĝis iom malklara; tial ni ĝin denove publikigas.

SOLVO DE PROBLEMO 95.

Horizontale : histrik, pom, zon, horar, sonat, kil, goril, nev, re, des, si, enketo, monato, iri, var, urogal moral, se, ejo, an, kan, agend, tro, loksi, ornam, tut, aer, kredito.

Vertikale : krepusk, hien, real, pol, kio, not, hor, vergo, kuk, imag, tia, astr, rodo, legi, te re, je, ad, sism, mono, izol, ovo, drat, kon, anaro, nero, nan, ara, tar, test, larm, violono.

Bone solvis : ges. Pollet, Keveryn, D'Hondt, Roose, Vincke, Iserentant, Couwenberg, Van Mullem, Pittoors, Van der Mast, Van Tuykom, Cantaert.

SOLVO DE PROBLEMO 95.

MALICA LANGO TRANĈAS PLI OL AKRA GLAVO.

Bone solvis : ges. Pollet, D'Hondt, Couwenberg, Van Mullem, Van der Mast, Cantaert.

SOLVO DE PROBLEMO 96.

- 62841 **Bone solvis :** ges. Pollet, D'Hondt, Van Mullem, Pittoors,
- 5379 Cantaert.
- 68220 Ankaŭ bone solvis problemon 92 F-ino Vincke kaj S-ro Roose.

FLANDRA ESPERANTO-INSTITUTO

(Vereeniging zonder Winstoogmerken. Staatsblad 20-12-1930. Akte 1227)
P. Van Humbeekstraat 3, BRUSSEL-WEST. Postcheck : 3268.51

Voor Examen-Candidaten

Het oprichten der Vlaamsche Esperanto-Examencommissie heeft klaarblijkelijk den studiezin der Vlaamsche Esperantisten aangewakkerd. De vraag naar degelijke studieboeken is merkelyk grooter dan vroeger. Dit is een verschijnsel dat we met vreugde aanstippen en verheugend noemen voor het taalkundig peil der Vlaamsche Esperantisten.

Door het publiceeren eener lijst van uitstekende studiewerken, denken we aan den wensch van menig candidaat voor diploma A of B tegemoet te komen.

- HOE KAN IK HET IN ESPERANTO ZEGGEN?** T. H. Buis-Faulhaber (28 blz.). 300 Nederlandsche zegswijzen vertaald naar de werken van Zamenhof ... fr. 3,50
- 100 VRAGEN OVER GRAMMATICA.** F. Faulhaber (16 blz.). Ten dienste van candidaten vor het examen B ... fr. 3,50
- Vóór HET EXAMEN A. (32 blz.).** Handleiding en oefenmateriaal voor A-candidaten ... fr. 4,00
- FREMDVORTOJ EN ESPERANTO.** P. Neergaard (64 p.). La 15-a regulo de l'Fundamento en teorio kaj praktiko ... fr. 5,00
- LEIDRAAD BIJ DE STUDIE DER ESPERANTO-LITERATUUR.** G. J. Degenkamp (48 blz.). Een werkje over onze beste schrijvers en vertalers. Aanbevolen aan candidaten voor examen B ... fr. 5,75
- GEBONDEN STIJL.** F. Faulhaber (40 blz.). Een en ander over poëzie in Esperanto ... fr. 5,75
- PONTO AL LA PRAKTIKO.** S. S. De Jong Dzn. W. Feenstra (64 blz.). Toegelichte vertaal- en lees oefeningen ... fr. 8,00
- LA VERBO EN ESPERANTO.** J. Glück-G. H. G. Willems (48 p.). Klaro studo pri uzo de la verbo ... fr. 10,50
- ESPERANTO EXAMEN-OPGAVEN.** J. C. en J. R. G. Isbrücker (4^e druk; 128 blz.). Ten dienste van A- en B-candidaten, met vertalingen ter controle van eigen vaardigheid ... fr. 12,00
- LA KONSILANTO PRI LA ESPERANTO-GRAMATIKO.** G. J. Degenkamp (120 blz.). 70 taalkundige artikelen in het Nederlandsch geschreven fr. 14,00
- EEN VERZAMELING ESP-SPREEKWOORDEN EN ZEGSWIJZEN.** M. de Waard. (72 blz.). Een rijke verzameling uitdrukkingen die menige moeilijkheid oplost ... fr. 14,50
- LINGVO STILO FORMO.** K. Kalocsay (144 p.). Interesa studo pri vortfarado, poezio, rimo, ritmo, elparolo. Plaĉe bindita 16,00
- DE VOORZETSELS IN HET NEDERLANDSCH EN IN ESP.** G. J. Degenkamp (112 blz.). Een uitvoerige behandeling over het gebruik dezer woordsoort. Stevig gebonden ... fr. 21,00
- TRA LA LABIRINTO DE LA GRAMATIKO.** F. Faulhaber (3^e druk; 340 blz.). Handleiding in de Nederlandsche taal ten behoeve van cursusleiders en examencandidaten. Een prachtwerk in stevig linnen band ... fr. 36,00
- PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO.** K. Kalocsay-Waringhien (2-a eldono, 488 p.). Gravega verko kiun devas posedi kaj trastudi ĉiu, kiu funde aŭ science sin okupas pri Esperanto. Bind. ... fr. 75,00

←	KUPONO por la 103a PROBLEMO	KUPONO por la 104a PROBLEMO	KUPONO por la 105a PROBLEMO
---	-----------------------------------	-----------------------------------	-----------------------------------

OOSTENDE

« Reĝino de l'flandra marbordo »

HOTEL METROPOLE

Kerkstraat 32

75 KOMFORTAJ ĈAMBROJ
kun fluanta akvo,
varma kaj malvarma

Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo.

Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano SNYKERS
havas la plej bonajn rekomendojn
kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ H. & H. BRAEKEVELT

ALLE DRUKWERKEN VOOR HANDEL, VEREENIGING
& FAMILIE (ROUW) ● IMMER KEURIG DRUKWERK
AUTOMAAT-INRICHTING VOOR GROOTE OPLAGEN

STATIEDREEF, 177 (TEL. 1080) ROESELARE

APERIS

LIBROKATALOGO-PREZARO
de Flandra Esperanto-Instituto

Petu senpagan alsendon !
P. van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

HERBERG

't VLAAMSCH HUIS

GROOTE MARKT 16, BRUSSEL

BONGUSTAJ TRINKAJOJ

Flandre agrabla atmosfero
Diversaj salonoj por societoj

Ejo de N. E. L. E.
(SEKCIO BRUSSEL DE FL. L. E.)

LA FARAONO

Romano de PRUS

el pola lingvo tradukis D-ro KABE
3 VOLUMOJ ! Kune 625 paĝoj !

Pasie interesa romano.
La traduko estas majstroverko de
nia granda Esperanto-stilisto.

35 fr.

Flandra Esperanto-Instituto
P. Van Humbeekstr. 3, Brussel-W.

Café Nieuwe Carnot

FRANS' NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat 70 Antwerpen

PLEJ BONAJ TRINKAJOJ
Salonoj por societoj
Malvarmaj manĝaĵoj
Bonega servado

EJO DE :

Flandrema Grupo Esperantista
(SEKCIO ANTWERPEN DE FL. L. E.)

Verko de alta valoro !

Por poezi-amantoj vera regalo !

SE AŬSKULTAS LA ANIMO...

Poemkolekto el la verko de GUIDO GEZELLE

El flandra lingvo majstre tradukis : H. VERMUYTEN

Kun portreto de la aŭtoro, sur senligna papero kaj en plaĉa vesto.

BROSURITE : fr. 10.—

BINDITE : fr. 15.—

MENDU ĈE VIA LIBRO-SERVO : F. E. I.